

Verschiĝnt maandeliks
Dertiende jaargang
MEI 1946
NUMMER 5 (143)

Vertegenwoordiger in Nederland :
NEDERLANDA ESPERANTO-CENTRO
Diergaardesingel 96, Rotterdam-C
Girorekening : 272818 van N. E. C.

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO v.z.w.
Redactie en Administratie :
Pieter van Humbeekstraat 3, Brussel-West
Postrekening : 326851 van F. E. I.

5 fr.; 's jaars	60 fr.	5 fr.; jarabono	60 fr.
Steunabonnement	100 fr.	Subtena abono	100 fr.
Voor Nederland	4 fl.	Por Nederlando	4 fl.
Overige landen	75 fr.	Ceteraj landoj	75 fr.

Milito, Instiganto de Inventema?

Fluganta Raketo, Penicilino kaj Atombombo

En ĉiu milito postulas la intereso de la intermilitantoj, ke estu eltrovataj unuflanke ĉiam novaj armiloj, objektoj por detruo kaj neniigo, kaj aliflanke ĉiam pli efikaj rimedoj por sindefendo, por kuracado de malsanoj kaj vundoj. La unua mondmilito grave progresigis aviadon kaj kirurgion.

Ankaŭ la dua mondmilito donis al la aviado fortan puŝon antaŭen. Ĝi estis tempo de amasproduktado de aeroplanoj gigantaj kaj pli gigantaj. Sed ĝi rezultigis ankaŭ la enpraktikigon de grava nova invento: tiu de la fluganta raketo. Kaj, je la fino de la milito, aperis la plej terura kaj samtempe plej grandioza el ĉiuj ĝisnunaj inventoj: atombombo.

Sed, dum ke aviado, raketoj kaj atombomboj servis por mortigo kaj detruo, estis farita alia eltrovo, servanta ekskluzive por savi homvivojn: Penicilino.

Penicilino estas kuracilo bazita sur pli fruaj esploroj. Jam en 1877 faris Pasteur kaj Joubert eltrovon, sur kiu aliaj povis plu konstrui. Penicilino la unuan fojon estis aplikata je paciento la 12-an de februaro 1941, en oktobro de la sama jaro oni uzis ĝin jam sufiĉe grandskale. El 171 pacientoj kun infektitaj karnovundoj resaniĝis post Penicilin-injekto 104 tuj, kaj 60 pli poste; nur ĉe 7 pacientoj la rimedo ne efikis. Poste tiu ĉi sama kuracilo savis la vivon de multaj miloj da aliaj homoj, kiuj sen ĝi estus liveritaj al certa morto. Penicilino estas efika precipe ĉe pusantaj vundoj, pulmonflamo, sangveneniĝo k.s.

La flugantaj raketoj kaŭzis ĝis nun neion krom malfeliĉo kaj mizero. Feliĉe ili povis dum la pasinta milito esti uzataj nur je limigita skalo. Kaj same la plej terura el ĉiuj ĝis nun eltrovitaj armiloj, la atombombo, preskaŭ ne estis uzata, ĉar ĝi aperis preta nur post la milito en Eŭropo, kaj en la milito kontraŭ Japanujo sufiĉis du tiaj bomboj por decidigi la japanan registaron al kapitulaco.

Sed ni povas imagi ke la fluganta raketo, en kombino kun la gigantaj povoj rezultigeblaj el kontrolata ekspluato de la atombombo, iam kapablos efektiviĝi unu el la plej kuraĝaj revoj de la homaro: flugadon alimonden. Ja tiuj ĉi povoj enhavas en si la ĝermon por revoluciigo de nia tuta tekniko, eĉ de nia tuta vivmaniero.

Ĝis antaŭ nelonge homoj timis ke post ok cent aŭ mil jaroj nia karboprovizio estos elĉerpita, ke same iam elĉerpiĝos la petrolo, kaj ke tiam ni ne havos materialon por varmigo de niaj hejmoj, por kuirado de niaj manĝaĵoj, por funkciigo de niaj ŝipoj, trajnoj, maŝinoj. La eltrovo de la ebleco fendi atomojn unu fojon por ĉiam forigos ĉiujn tiajn timojn kaj zorgojn, la atombombo faros nin post kelkaj jarkoj nedependaj de karbo kaj petrolo kaj de aliaj energiefontoj.

Nekalkuleblan damaĝon kaŭzis la lasta milito al la homaro. Multege da objektoj de plej alta kultura valoro estas detruitaj. Milionoj da homvivoj pereis. Multaj aliaj milionoj de niaj homfratoj por la daŭro de sia vivo restos kripluloj. Kaj kvankam sur la kreditflanko de la milito ni povas enskribi la grandiozan kuracilon Penicilino, kaj kvankam ankaŭ la eltrovoj de la fluganta raketo kaj atombombo iam povos esti servigataj al la progreso kaj kulturo tuthomara, tamen volonte ni restus ankoraŭ dudek aŭ kvindek jarojn sen la nomitaj eltrovoj, se per tio ni povus atingi ke la milito ne estus okazinta. La rezono,

Mevrouw Roosevelt over het Vraagstuk der Internationale Taal

In de pers werd voor een paar maanden melding gemaakt van de volgende uitspraak van mevrouw Roosevelt: «De verscheidenheid der talen is een ernstige hindernis... Ik hoop, in de Organisatie der Vereenigde Volkeren het voorstel in te dienen, dat alle kinderen in de geheele wereld naast de taal van hun eigen land, een tweede taal zouden leeren, welke overal dezelfde moet zijn.»

In een artikel verschenen in «De Nieuwe Standaard» (d.d. 14-2-46) waaruit we ook bovenvermeld citaat ontleenen, lezen we nog enkele belangrijke opmerkingen: «Mevrouw Roosevelt vertolkte met haar voorstel den wensch van de meerderheid van het Amerikaansche volk, zooals bevestigd door een poll georganiseerd door het gekende Gallup-Instituut. Dit gebeurde in verband met een interview dat President Truman in October 1945 aan de «New York Times» verleende en waarin hij het verschil der talen «een der hoofdzakelijke hindernissen voor de internationale vriendschap en samenwerking» noemde.»

Verder is er de uitspraak van Prof. Mario Pei van de Columbia-Universiteit: «De oorlog heeft Amerika taalbewust («language-conscious») gemaakt. Voor miljoenen Amerikaansche soldaten was het een verrassing te moeten vaststellen hoe

weinig menschen in andere landen Engelsch verstaan.»

Van al deze uitspraken lijkt die van mevrouw Roosevelt ons de voornaamste



Mrs. ELEANOR ROOSEVELT

en de belangrijkste omdat ze een praktisch besluit inhoudt: ik hoop... in te dienen! Want daar komt het toch op aan: handelen. Het oogenblik is er geschikt voor en de stemming gunstig. De behoefte aan een internationale hulptaal wordt met den dag duidelijker gevoeld. Ten bewijze de uitspraken van vooraanstaande staatslieden, de uitspraak van het Amerikaansche volk in verschillende «polls», en last not least in ons eigen Vlaamsche land de belangstelling gebleken uit de overtalrijke inzendingen voor de «Vrije Radio-Tribune» waar deze het onderwerp «Wat denkt U over de noodzakelijkheid van een internationale taal?» in den nationalen zender behandelde.

Volgende flitsen uit de pers werpen zoo mogelijk een nog schriller licht op de taalmoeilijkheden. We lichten uit «Het Laatste Nieuws» van 10-2-46: «De moeilijkheden op taalgebied zijn gisteren op een vergadering der subcommissie van de O. V. V. oorzaak van veel vermaak geweest, omdat het secretariaat geen tolken kon leveren. De Fransche afgevaardigde sprak enkel haar moedertaal, de vertegenwoordigster van Zuid-Slavië bediende zich ook van het Fransch. Tamelijk veel afgevaardigden verstaan wat Engelsch, maar indien ze de juiste betekenis van de redevoeringen willen begrijpen moeten deze vertaald worden.» Uit «De Nieuwe Standaard» van 19-1-1946: «De persconferentie van dhr. de Menthon werd in het Engelsch overgezet. Toen de vier officieren van den persdienst van het Roode

Leger, die in de zaal aanwezig waren, bemerkten dat er geen Russische tekst van opgemaakt was, verlieten ze onmiddellijk de conferentiezaal. Een welwillend vertaler was onmiddellijk bereid deze vertaling goed te maken en er werd inderhaast een boodschapper gestuurd naar de Russische journalisten. Deze weigerden echter naar de zaal terug te keeren om aanwezig te zijn bij de vertaling.»

Dit moge volstaan om eenieder duidelijk te maken dat er wel degelijk taalmoeilijkheden bestaan en dat er zich een taalprobleem stelt. En de lichtgeraaktheid, vln. van de vertegenwoordigers der grooten naties, bewijst ten overvloede dat hierin niet kan verholpen worden door deze of gene nationale taal als internationale aan te stellen. Al pakken simplistische geesten nog zoo vaak uit met deze «oplossing».

Niet alleen om politieke maar ook om culturele en pedagogische redenen is het aanwenden van een nationale taal als algemeene hulptaal uitgesloten. Blijft enkel een neutrale, geconstrueerde taal, op voorwaarde dat ze leefbaar zij, evolueeren kan, alle uitdrucksomogelijkheden biedt, zich aan elken levensvorm aanpassen kan. En welke oordeelkundig beoordeelaar zal deze eigenschappen aan het Esperanto kunnen ontzeggen?

Wil mevrouw Roosevelt konsekvent en logisch doordenken dan moet ze onvermijdelijk bij Esperanto belanden. En het is de taak der Esperantisten de wereldopinie niet alleen warm te maken voor de idee van een internationale taal maar ze op het uitstekende middel te wijzen dat bestaat, zijn deugdelijkheid en leefbaarheid heeft bewezen en kant en klaar voor 't grijpen ligt: het Esperanto!

Daarom komt het petitionnement voor Esperanto en gericht tot de O. V. V. te rechter tijd en is het zaak miljoenen verzoekschriften te verzamelen. We lezen in «Esperantobladet», dat te Oslo verschijnt, dat de Noorsche Esperantisten het tot op heden bij de 70.000 verzoekschriften houden! Is dit geen merkwaardig resultaat voor een land met minder dan drie miljoen inwoners? En zullen wij, Vlaamsche Esperantisten, voor de Noorsche onderdoen?

Wat de Esperantisten destijds bij de Volkenbond hebben beproefd, en wat er een principieele maar platonische goedkeuring wegdroeg, slaagt nu wellicht en met beter gevolg bij de O. V. V. Mocht Mrs. Roosevelt er het hare toe bijdragen, we zouden er haar diep-erkentelijk voor zijn.

E. SYMOENS.

1940

Ve, katastrofo: la malfamiko
Per artifikaj kaj akra piko
Celis nin trafi meze en koron,
Krude detruu nian laboron!

Jam nia voĉo restas silenta,
Kaj nia plumo — malfokventa;
Nia agemo paralizita
Post la insida bato subita.

Sanktajn la signojn, kiujn ni pie,
Stelojn la brilajn, kiujn defie
Ni manifeste portis sur brusto,
Nun en tirkesto mordas la rusto.

Kaj la standardojn niajn nobelajn,
Kiujn en vento verdajn kaj ŝvelajn
Tiel fiere alte ni svingis,
Ilian brilon polvo estingis.

La idealoj noblaj, altflugaj —
Nun en katenoj, nune subjugaj,
Mokbombardataj, persekutataj
De uloj brutaj, maldelikataj.

Sed ne atingos rusto la koron,
Sed ne estingos polvo fervoron;
Nur al obstino moko instigas,
Kaj persekutoj nin ne subigas.

Ja ne formortos justu kaj vero,
Nek forgesigos nia afero.
Pasos la tempo, ĉesos ĉikanaj,
Pasos teroro kun la tiranoj.


Supren denove flugos la flago,
Steloj revidos lumon de l' tago;
Vivos kaj venkos justu kaj vero,
Fine triumfos nia afero.

T. JUNG.

ke milito estas subteninda, tial ke foje ĝi instigas la inventemon, ne estas morala, nek honesta. Tiu inventemo kutime iras nur en definitiva direkto, kaj la inventemo en alia direkto dum la daŭro de la milito kutime estas paralizita. Milito estas kaj restos plej granda krimo de la homaro.

T. J.

XI-a KONGRESO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA



BRUGGE: la historia urbodomo en kiu okazos nia ĝenerala jarkunveno.

OBSERVOJ

PANTALONA TRAGEDIO.

Mi konas personojn kiuj iĝis esperantisto pro kaŭzoj kaj kialoj plej diversaj: pro eno, pro snobismo, pro eraro, por plaĉi al knabino, por koketi kun la kursgvidanto... Mi konas eĉ kelkajn kiuj iĝis esperantisto pro inklino kaj admiro al la alta celo de l'esperantismo. Kaj nun mi konas ankaŭ personon kiu esperantistigis pro... pantalona tragedio. Jes, efektive!

Antaŭe li opiniis internacian lingvon tute superflua. Se li vojaĝis al eksterlando, li kunprenis poŝvortaron; laŭ li tio sufiĉas al inteligenta homo. La malon li spertis en Italujo, kie, en publika promenejo, li rimarkis puran, ripozinvitan benkon sur kies dorsapogilo pendis ŝildeto kun la mencio: «VERNICIATO DI FRESCO».

Li sidigis, elposigis sian vortaron, serĉis en ĝi la signifon de tiuj vortoj, kaj... saltlevigis. «Tiam — li konfesis al mi — mi komprenis la bezonon de internacia helpa lingvo, kiu devus esti uzata en ĉiuj publikaj ejoj. Kiom agrabla kaj kiom sendanĝera iĝus la vojaĝado — kaj kiom pura la homaro tenus sian pantalonon.» Jes, efektive. PIK.

OVER DEGELIJKE ARGUMENTATIE!

Gelezen in het «Katholiek Cultureel Tijdschrift» van 15 Februari 1946 op p. 67 onder den titel: Esperanto, de Taal der Toekomst? «...Als grondslag nam de samensteller, L. Zamenhof, den woordenschat van het Duitsch, het Engelsch en de Romaansche talen. De Slavische talen is hij voorbij gegaan. En hier doet zich een bezwaar gevoelen. Het principe is een taal te ontwerpen die voor allen gemakkelijk aan te leeren is. Kan men dan plus minus 200 millioen menschen in Europa, die Slavische talen spreken, voorbijgaan?»

EEN ANDERE KLANK.

Dergelijke onoordeelkundige uittaling wordt den goedgeelovigen buitenstaander voor de voeten geworpen die den indruk opdoet hier voor «degelijke argumentatie» te staan. We zullen deze uittaling van een klaarblijkelijk ter zake onbevoegde niet zelf weerleggen, maar ons oer te luisteren leggen bij A. Meillet, een specialist in Slavische talen, die in zijn groot werk «Les langues dans l'Europe nouvelle» het volgende zegt: «Européen oriental, Zamenhof a fait de regrettables concessions à l'archaïsme de l'allemand et surtout des langues slaves.» Het is maar al te duidelijk dat onze zegsman uit het Katholiek Cultureel Tijdschrift zich vermeten heeft over zaken te handelen die hij niet, of onvoldoende kent. Al gaan we ook niet akkoord met Meillet — overigens een bewonderaar van Zamenhof — die, zoo niet uitsluitend dan blijkbaar toch overdreven overwegend, den invloed der Romaansche talen in de constructie der internationale taal zou hebben gewenscht.

REST ONS HET ENGELSCH,

vervolgt Elders zijn artikel in vernoemd tijdschrift. En hier zien we alle voordeelen vereenigd. Afgezien van het feit dat het de meest verbreide taal is, wordt het gebruikt in techniek, sport, handel en scheepvaart. Het vereenigt in zich Germaansche en Romaansche elementen... Thans is het door zijn Germaansch-Romaansch karakter bij uitstek geschikt als gemeenschappelijke taal te dienen. En wat doet nu de heer Elders met de Slavische volkeren?! Of was het er maar om te doen een stok te vinden?

DE VOORSTANDERS VAN HET ESPERANTO,

zoo besluit hij zijn artikel, zoo o. a. indertijd de Fransche taalgeleerde Meillet, noemen dit een onbillijke bevoordeling van een bepaalde taal ten opzichte van de overige talen. Op het oogdenblik lijkt ons dit bezwaar niet steekhoudend meer. De Angel-Saksische volken hebben in dienst van de menscheit zooveel gepresteerd dat deze begunstiging slechts een compensatie kan zijn.

Weet dhr. Elders dan niet, en met hem al de bewonderaars van de Angel-Saksische volken, dat politieke verhoudingen gedurig veranderen, en dat het invoeren van een gemeenschappelijke internationale hulptaal hoegenaamd niets mag te maken hebben met de momenteele machtsconstellatie, doch juist boven en buiten politieke, economische, godsdienstige en filosofische verhoudingen moet staan als overkoepelend verzooningselement?

Heraldo reaperas!

Nia granda internacia periodaĵo, post sesjara interrompo, denove aperas!

Pro lokmanko ni devas prokrasti la aperigon de la recenzo pri la unua riĉenhava numero ĝis venonta monato. Ni jam koncize diru ke Heroldo impone aspektas: gazetformata, okpaĝa, ilustrita, interesa kaj presita sur bela papero.

Heroldo estas abonebla pere de F.E.I. (abono por 1946 kostas 100 bfr.).



XI-a KONGRESO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

Brugge, Pentekosta 1946 (8-9-10 Junio)

LASTA ALVOKO!

Nur kelkaj tagoj ankoraŭ disigas nin de nia unua postmilita kongreso. Samideano, se vi ne jam faris, prenu tuj decidon kaj anoncu vin al la organiza komitato: urĝas!

Venu kun ni pasigi belajn horojn en Esperantujo. Venu kontakti kun la malnovaj kaj la novaj esperantistoj kaj kun la eksterlandaj samideanoj kiuj jam anoncis sian partoprenon. Specialan bonvenon al ili! Venu al nia X-a kiu evidente iĝos sukceson!

Ni dankas la kongresanojn kiuj frue aliĝis kaj pagis por la aranĝoj: ili konsiderinde helpis nian organizan laboron. Specialan dankon al tiuj aliĝintoj kiuj mondonacis por la kongresa kaso!

Adreso de la kongresa oficejo: J. en M. Sabbestraat 12, Brugge (P. K. 479170) je nomo de H. De Kersgieter.

Kongresanoj atentu:

La Belga Societo de Fervojoj ne plu konsentas la antaŭmilita kutiman rabaton al kongresanoj. Tamen ir-kaj revenbileto estas akirebla kun rabato de 20%. Ĝi validas dum kvar tagoj, dum kvin tagoj okaze de Pentekosto.

Ciujn kongresdokumentojn (enkluzive la kongresprogramon kun plano indikante la diversajn ejojn je kies fasadoj cetere flirtos la Esperanto-flago) vi ricevos en la akceptejo: «Aigle Belgica» (angule de Smedenstraat kaj Guido Gezellelaan, apud Smedenpoort) kun aparta enirejo por la kongresanoj flanke de G. Gezellelaan. La akceptejo troviĝas je distanco de 10 minutoj de la stacidomo.

La sekcioj de Fl. L. E. delegu reprezentanton al la kongreso kiu i.a. dum la ĝenerala jarkunveno mallonge raportu pri la loka situacio kaj saluto la kongreson.

ĜIS BALDAŬA REVIDO!

PROGRAMO

SABATE:

- 16-a h. Malfermo de la akceptejo.
- 18-a h. Kunveno por la membroj de Flandra Esperanto-Instituto (akceptejo).
- 19-a h. Sonorilarkoncerto (starloko: Gruuthuuse).
- 20-a h. Interfratiga festo kun balo (akceptejo).

DIMANCE:

- 8-a h. Malfermo de la akceptejo (ĝis la 10-a).
- 9-a h. Vizito al la urbaj vidindaĵoj (kunveno: akceptejo).
- 9-a h. Por Katolikoj: Diservo kun prediko en Esperanto en la historia kapelo de la Sankta Sango (Burgplaats).
- 10-a h. Oficiala akcepto en la urbodomo (Burgplaats).
- 11-a h. Ĝenerala jarkunveno de Fl. L. E. en la gotika salonego de la urbodomo (Burgplaats).
- 13-a h. Fotografado de la kongresanoj sur la ŝtuparo de la Provincestrejo (Groote Markt).
- 14-a h. Komuna tagmanĝo en hotelo «Lybeer» (Korte Volderstraat).
- 17-a h. Ekskurso per motorboatetoj sur la urbaj kanaloj (kunvenloko: Dijver).
- 20-a h. Esperantista festo kun varia programo en «Cooperative» (Hoemakersstraat, apud Augustijnenbrug).

LUNDE:

- 10-a h. Forveturo per specia tramo al Knokke ĉe Maro (kunveno: akceptejo).
- 12-a h. Foriro por promenado laŭlonge de la marbordo ĝis Duinbergen kaj Heist-ĉe-Mar (3 km.).
- 14-a h. En Heist-ĉe-Mar: komuna tagmanĝo kaj Adiaŭa Kunveno (orkestro) en hotelo «Mondial» (Graaf d'Urselleaan 15, vidalvide de la stacidomo).

N. B. En kazo de malbona vetero la lundana programon anstataŭos aliaj allogaj aranĝoj.

PARTOPRENU CIUJN PROGRAM-ARANĜOJN, NI GARANTIAS AL VI NEFORGESEBLAJN TAGOJN!

LA STUDANTO DE PHONETIEK (XI)

De tweeklanken (diftongoj)

OEFENING 13

VERTAAL:

A. Het oud gebouw:

De tweeklank, of samenvloeiing van twee klinkers tot een ondeelbaar geluid en die slechts als één lettergreep geldt, doet zich in 't Esperanto niet voor zooals in 't Nederlandsch, b.v. **au** in kauen, of **ou** in koud enz.). Elke klinker vormt een afzonderlijke lettergreep en wordt apart uitgebracht (b.v. ba-la-i), tenzij op één der klinkers — en dat is het geval slechts met **u** — een boogje voorkomt: **ü**.

In den regel gaat de gewone klinker vooraf: **au** (b.v. baldau, **eü** b.v. neutrala), uitzonderlijk **ou** in poŭpo; als eerste letter treft men **ü** slechts aan in klanknabootsingen zooals **üa** (kindergescrei) **üaks** en in den naam der letter zelf **üo**. Zij wordt uitgesproken ongeveer als onze w. Plena gramatiko noemt haar een duonvokalo («halve klinker»): zij klinkt inderdaad als een klinker (nl. korte **u**) doch, gelijkend op de medeklinkers, vormt zij geene afzonderlijke lettergreep. In het Esperanto duidt dus het boogje een tweeklank aan.

BESLUIT.

Na onderzoek van de bizonderste punten der phonetiek, passen eenige gevolgtrekkingen van algemeenen aard:

1^o Esperanto bezit, wat zijn uitspraak betreft een eigen «muziek», zooals iedere nationale taal.

2^o De wenschelijkheid der veralgemeening van ééne uitspraak ligt voor de hand.

3^o De verstrekte richtlijnen zijn niet veelvuldig en gewis gemakkelijk: vaak zijn zij slechts de vaststelling van een natuurlijk gebeuren en het is eerder hun formuleering die een inspanning vergt (men denke aan het aantal lijnen vereischt om de eenvoudigste zet van het schaakspel te beschrijven!).

4^o De praktische verwezenlijking van de richtlijnen hangt niet af van steller of een andere theorie, doch van de Esperantisten zelf die er prijs moeten op stellen hunne uitspraak te verzorgen en hare eenvormigheid in eigen milieu te bevorderen!

Vooraleer in volgene bijdragen andere vraagstukken aan te snijden — suggesties zijn bizonder welkóm! — geven wij infra onze voornaamste bronnen en documentatie op, en sluiten wij door een bondig overzicht onzer behandeling van de phonetiek.

BRONNEN.

Fundamento de Esperanto, 8-a eldono, 1931 kaj Lingvaj respondoj, 3-a eldono, 1936; ambaŭ de Dro L. L. Zamenhof, E-ista Centra Librejo, Paris.

K. Kalocsay-G. Waringhien, Plena Gramatiko de Esperanto, II. Tralaborita eldono, L. M., Budapest, 1938.

Paul Fructier, Kompleta Gramatiko kaj Vorfarado en Esperanto, reviziita kaj kompletigita de S. Grenkamp-Kornfeld, E-ista Voĉo, Jaslo (Pollando), 1930.

F. Faulhaber, Tra la Labirinto de la Gramatiko, 4^a druk, F. L. E. Amsterdam.

Dro E. Privat, Esprimo de Sentoj en Esperanto, U. E. A., Geneve, 1931.

BONDIG OVERZICHT.

Algemeen, zorgeloosheid der uitspraak en hare oorzaak, wenschelijkheid van één uitspraak, bepaling der Phonetiek (Inleiding); Omschrijving: woord, lettergreep, klinker, medeklinker. De «muziek» van Esperanto (Vervolg I); Regels door Zamenhof vastgesteld: a) De phonetische (Vervolg III); Eigenlijke Uitspraak: Het alfabet, De rede Privat, Algemeenheden over klinkers en medeklinkers, hun aantal, naam, onderscheid naar stem, plaats en wijze van ontstaan (Vervolg IV), verklaring van den naam en onderscheid (Vervolg V). De klinkers: Lang-korte uitspraak, bepaling, richtlijnen (Plena Gramatiko (Vervolg VI); Open-gesloten uitspraak: bepaling verscheidenheid, bizonder aangaande e-o, opvatting van Zamenhof Cefeĉ Wüster, Kalocsay-Waringhien, richtlijnen (Plena Gramatiko (Vervolg VIII-IX-X) De medeklinkers: aantal, naam, regels der uitspraak er van (Vervolg VII); De tweeklanken («duonvokalaj»). Besluit, bronnen, bondig overzicht (Vervolg XI). T. V. G.

In dat oud gebouw woonde de oude hovenier Lope met zijn dochter. Het was in vroegere tijden door een adellijke Spaansche familie bewoond geweest; maar dat was reeds lang geleden, vertelde men: de stam was uitgestorven. Na den dood van den baron en het baronesken werd het huis verkocht, en sedert was het in de familie van den hovenier gebleven. Ook het huisraad was hier en daar verspreid geworden, ja zelfs de portretten van den baron en het baronesken hadden hetzelfde lot ondergaan, en waren nu, men wist niet waar versukkeld. In den omtrek zei men dat zij daar nog spookten en dwaalden en hun weg zochten. De kleine Olive had het reeds van in haar kindsheid hooren vertellen; want haar vader kon er over in het lang en breed uitweiden: hij had het van zijn grootvader vernomen en hij toonde nog de haken aan den muur in de groote zaal, waaraan de portretten gehangen hadden. (Uit «De Verdwaalden», novelle van Virginie Loveling).

B. Fokso, la hundo, kaj la muŝo.

Ekster la domo brilas la suno, la birdoj kantas kaj la floroj odoras. En la domo ĉio kaj ĉiuj estas trankvilaj. Estas idilio. Sed la idilio ne daŭras. En la ĉambro estas ankaŭ muŝoj. La muŝoj zumas en la ĉambro, kaj la trankvilo kaj la paco estas for. Jen sidas muŝo sur unu nazo, jen sur alia nazo. Nun sidas muŝo sur la hunda nazo, kaj Fokso estas furioza, ĝi bojas per ĉiuj fortoj. La tuta familio tremas pro la forta bojado. Sinjoro Grann parolas al la hundo, sed la hundo ne estas obea. Lisa pro timo komencas plori, kaj larmoj fluas el la malgrandaj okuloj. La bela idilio ne plu estas. (El «Okazas Nenio», de Chr. Hougaard, originala romaneto, p. 5).

VERTALING VAN OEFENING 12

A. Frazetoj:

1. Vi aĉetas multekostajn librojn; sed tiuj librojn vi ne devas legi, ĉar ili estas tro sciencaj.
2. La vizito de lia bofrato nedireble plezurigis lin.
3. Reĝo vizitis vilaĝeton kaj deziris manĝi ovojn; la gastejestro donis tri da ili kaj kalkulis ses guldenojn.
4. La reĝo miris kaj demandis ĉu la ovoj tiel maloftas en la regiono; al tio la gastejestro respondis: «Ne la ovoj maloftas, sed la reĝoj!»

B. Japansche Zeden:

Buitenshuis gedragen Japansche echtelingen, die de traditie nog nakomen, zich alsof zij elkaar niet kennen. Men ontmoet hier (Osaka, 1937) dus geen paartjes die gearmd loopen. Nergens ziet men gekus. Zelfs de moeder kust haar zuigeling niet, doch ongegeneerd laat zij haar borsten zien. Het openlijk gekus is voor de Japanners iets zeer vulgair. De handdruk is heel uitzonderlijk en «een ingevoerde doenwijze». De Japanners groeten elkaar door een rechthoekige buiging, indien zij buiten woonst zijn; in (hun) woonst, knielen ze op een mat en dan raakt het hoofd bijna den vloer. (Uit «Leteroj de E. Lanti», blz. 197).

LA REDAKCIO RESPONDAS:

Pri la marta ekzerco, N^o 11: Kvankam la konkursaj tekstoj ne estis tre, tre malfacilaj, nia «severa okulo» ne renkontis erarojn nur en du el la ensendoj. Ni sincere gratulas la «korektajn» studantojn! Ĉar ambaŭ tekstoj estis tute samvaloraj, la sorto decidis kaj jene atribuis la premiojn: 1. La busteton de nia Majstro al T. Aagaard (li aŭ si komunikis sian adreson al F.E.I. por ke tiu ĉi havigu la rekompencojn); 2. La romanon «Sub la Vitra Kupolo» de L. Van Weddingen al H. Lodema, Antwerpen.

Kiam ĝenerale ni konsideris la ensendojn, ni konstatis ke ĉie la nederlandigo estas perfekta, sed ke la traduko en la esperanton montras la subajn ĉefajn erarojn: de **jongste** (van twee): la pli juna (ne: plej, ĉar kiam la komparo koncerne nur du elementojn oni uzas tute logike la komparativon kaj ne la superlativon); **vier aan vier: po kvar**, ne «kvar kaj kvar» aŭ «kvarope» (la **-op-formo** signas la nombro da elementoj el kiu konsistas certa grupo — ĝi do **kollektivigas!** la **po-formo** indikas ke nombre nedifinitaj elementoj estas grupigitaj laŭ grupoj de, en nia kazo, kvar infanoj — ĝi do **distribuas**: tial ankaŭ «laŭ kvaropoj»). Nadat de kinderen den tuin van hun oom...: nepre **sia**, ĉar oni resendas al la subjekto, nome la infanoj; estas la onklo de la infanoj...

La aliaj eraroj, cetere ne tre oftaj, ne estis tiel gravaj: ĉiuj ensendintoj do meritulis laŭdon kaj estos aliaj konkursoj kaj aliaj interesaj premioj!

A. kaj M. W., Breedene aan Zee; A. C., Antwerpen; J. D., St Mariaburg; K. H., Schoten; H. L. Antwerpen; Verda (Ho! kvarope!!): via teksto estis resendita kun personaj notoj.

LA MIGRANTA JUDO (Fragmento)

Verkis : A. Vermeyleen.
El la Flandra : Hedero.

En tiu tempo, kiam la Sinjoro ankoraŭ predikis inter la homoj, vivis en Jerusalema keleto ŝulfikisto, nomiganta Ahasvero. Vigla, altkreska judo, kun osta vizaĝo kaj okulparo en kiu estis flamo; li naskiĝis en la sama jaro kiel Kristo.

Li ŝatis senti la teron sub la piedoj, kaj li nomis ion nerektan kurba, kvankam li ne parolemis: ĉiu iras ja propran vojon, li pensis, kaj la morto estas ĉies sorto.

Tiu ĉi Ahasvero ne sentis sin feliĉa. En li estis io, kio agitis lin, interne de li io brulis, kion li ne sciis regi, li similis iun kiu enlitiĝe turnas kaj returnas sin kaj ne trovas dormon.

De tagiĝo ĝis nokto li restis kaŝita en sia keleto, tranĉis sian ledon, tiris la peĉfadenon, flikis duombotojn, martelis planojn kaj kalkanumojn, sklavis ke polvis ĉe la najbaroj, sed neniam li aŭdis buteron dolĉe brueti en la pato. Tagon post tago: ĉiam samis, ĉiam samos: li ne plu eskapas, la vivo tenis lian nukon kaj puŝis lin antaŭen.

Kien? Al la fino.

Kial? Tial.

Li vidis naskiĝi la infanojn, malfortajn sendefendajn etulojn, li vidis la homojn, junajn kaj maljunajn, morti, ĉion sen motivo. Li vidis kiel la grandaj glutas la malgrandajn; li vidis la malsafegajn penulojn de sia strateto fariĝi hundoj, batalantaj pri ostoj; li vidis senkulpajn infanetojn martire suferi. Kaj li jam volis ridi pri la tuta sensenca farso, ĉar plori li eĉ ne plu kapablis, li ĉion subpremis, kaj ŝtono pezis sur lia koro.

Sur sia ŝulfikista seĝeto li ofte cerbumadis pri tio, kaj liaj pensoj turniĝadis kiel pudelo kiu postsaltas sian voston. Li ekstaris, denove sidigis, rigardis ĉirkaŭ sin en sia malvasta keleto, kvazaŭ ĝi odoros fombon. Kaj tiam bruta impulso iam atakis lin, obstine li batadis la malnovan boton, fiksan inter liaj genuoj, batadis kiel la diablo animon, kaj en li minaca voĉo kriis: Tio ĉi devas finiĝi! Devas finiĝi! kaj lia akra okulo flagris. Sed morgaŭo similis hodiaŭon kaj postmorgaŭo antaŭhieraŭon, kaj Ahasvero, tio estas memkomprenebla, nur vivis plu, laŭ la homa tradicia kutimo. Kaj la tagoj fluis, post unuj aliaj, kiel se iu Ahasvero neniel ekzistis.

Kiam kliento kline subenpalpis lian ŝtupareton li atendis ĝis la kliento parolas kaj lakone informis lin. Li montru siajn kalkanojn, li pensis, por resti sola; — sola kun la malluma ardo brulanta en li. Kion tiuj ĉi mallaboruloj povus rakonti al li, se ne pri sia mizera vivo, sama kiel la lia! Kun infanoj li ja volis ŝerci, sed ili timis lian ridon kaj ne volentis en lian strangan kavon.

Kiam lia soleco fariĝis tro teda, li iris vagi en la malpuraj stratetoj plenaj de mizerodoro, kie svarmis petolaj bubaĉoj, legomistinoj kiuj klaĉis ĉe siaj ĉaretoj kaj ĉie, antaŭ la keloj, sur la trotuaroj, en niĉoj sub la peronoj, sakuloj kiuj komercaĉis kaj disputis kaj kriis. Sed riproĉe li rigardis la pasivan kanajlaron, kaj tie sin sentis pli sola ol iam.

Iam ŝajnis al li ke li bezonas nur unu ajon, unu vorton por feliĉiĝi: sed neniu terano sciis diri tiun vorton al li. Li jam volis etendi siajn brakojn por foje traskui la tutan vivon, sed li bone sentis ke neniam faro plenigos la teruran oscedon de lia koro, ke ĉiaj pecetoj neniam satigos lin, ke ĉiam li volos pli antaŭen, libere, pli libere ol la alaŭdo, ol la ventoj, ol la morto, kaj ke tial ĉiu deziro vanas, ĉio vanas.

Kaj tiel li kaptiĝis en sia damno, kiel en kelo sen pordo aŭ truon.

Sed tamen, kvankam li foje ŝajnis tute delira, estis io en la profundo de lia koro, tiel profunde ke li mem ne vidis ĝin, kion neniu demono povis tuŝi. «Ili ne trompos min», li parolis al si mem, kaj rikanetis, kaj persistis, kaj rigidigis. Ĉar mi diru al vi: li estis viro de l'kapo ĝis la piedoj, neniel personeto miela, nek amajisto nek tima, sed hardita ŝtupo, kun paro da tendenaj labormanoj, klarvida kapo kaj neŝancelebla koro.

Nu, vi eksciis, estis kruda tempo, kaj la popolo devis multon suferi: la greno, staplita en la subtegmentoj de la riĉuloj, kostis egan monon kaj la sentinaj impostoj kaj dekonajtoj tute forigis la grasosaiumon de la supo. Ke oni grumblis, vi ja komprenas: oni komplotis, oni konspiris tie kaj alie. Dimanĉe, kiam la fulistoj kaj la teksistoj trinkis, iliaj kvartaloj estis bruaj kaj tiam la patricioj kaj la elsuĉantoj de la popolo tremis en siaj riglitaj domoj. Ahasvero silente moketis kaj ŝultrolevis, ĉar jam li sentis ke la tutan mondon li povus vendi kontraŭ sinko. Li tamen, vidis kun sekreta plezuro ke ĉe la popolnombrodo kaj tributpago oni ade pli ĉikanis. «Eble ili ja foje bravigos!» li pensis. Sed kiam tiam la kirasitaj halebardistoj kun kruelridaj vizaĝoj rajde aperis sur la placo, neniu plu eligis sonon.

La situacio ankoraŭ favore evoluos, li pensis, kiam li unufoje vidis la Nazaretanon.

Jam de kelka tempo li aŭdis kiel tiu ĉi fremdulo, spitante ĉiujn pastrojn kaj uzuristojn, arigis la etajn ĉirkaŭ sin kaj konvinkis ilin per sia interne-flama parolo; kaj ĉiuj kredis lin, kiam li antaŭdiris ke ili estos feliĉaj kaj ke iam la bono regos surtere.

«Ventkapuloj!» konstatis Ahasvero, kaj li senprokraste rampis en sian kavon. Sed alfoje li sciigis kiel, en la Templo, la Nazaretano renversis la tablojn de la

monŝanĝistoj kaj jetis ĉiujn iliajn ruliĝantajn disketojn sur la resonantan pavimon, kie, kliniĝante sub lia ŝnuroskurĝo, ili serĉkaptis ilin; kaj kiel li pelis el la Templo la kolombo-bredistojn, kiuj vendis kolombojn por la oferoj. Tiu tagon Ahasvero silentis.

Kaj iom poste li vidis Lin mem. Vespere, estis ekster la urbomuroj, kie laboris, inter malluksaj aperturoj kaj loketoj plenaj de karbocindroj kaj potopecoj, la ŝnur- kaj briklaristoj. Tuta popoltrenajo sekvis lin el Galileo, mizeruloj kiujn, pro ilia vilaĝa aspekto, insultis la bubaĉoj en la strateto de Jerusalemo, ruĝaj veterharditaj fiŝistoj kaj malsataj longkreskintoj kun frenezaj okuloj kaj barbaĵ vinberistoj kun obstinaj kapoj: ili ĉirkaŭis sian Majstron kaj kapjesis ĉian lian diron. La ŝnuristoj forlasis sian areon kaj la briklaristoj sian fornon: la helplaboristoj, kiuj hejmeniri el la urbo, kun sia ilaro sursultre, haltis por rigardi, kaj ankaŭ ĉestis Galileanoj el Jerusalemo, nenionfarantoj de ĉiu speco, putaj kripuloj kaj kelkaj diboknabinoj, inter multaj infanoj.

Ĉu la Galileano mem sciis kion li deziris? Kial li aludis pardonon kaj amon, se li volis rompi la povon? Kaj kiel li donus al la malsataj kaj subpremitoj la plej bonan lokon ĉetabele? Kiel li nun ŝangus la homojn? Ĉu lia Nova Regno estis nuba, aŭ ĉu li volis fariĝi la reĝo de Jerusalemo, kaj ĉu tiam ĉiu tago estus dimanĉo kaj ĉiu dimanĉo kermeso? Li certe diris: Via vorto estu jes, jes, ne, ne! Sed tiam, kial ĉiuj liaj komparoj kaj metaforoj, kiuj nur konfuzis? Sed li estis nur revulo!... Kaj kial li diskutadis horojn kaj horojn en la Templo pri Leĝo kaj Profetoj kun la hipokritaj Farizeoj «la stukitaj tomboj», li mem koncedis tion, «kiuj ekstere belaspektas, sed interne plenas de mortostoj kaj de ĉia malpuro»? Eĉ liaj Disĉiploj, kiuj kiel simpluloj kuniris ĉien, ne povis kompreni multon el tio. Kial li ne decidis foje riski la aventuron kun kelkaj fortikaj kunuloj? Sed, kiam la spiritoj ekzaltiĝis kaj ekribelis, tiam li tute trankvile promeniis al Betanio, ĉe la fratinoj de Lazarus! Ne, ankaŭ tio ne plaĉis al Ahasvero: tro da virinoj ĉiam ĉirkaŭis lin.

AUGUST VERMEYLEEN

« Ni devas esti Flandroj por fariĝi Eŭropanoj! »

Pasintjare Flandrujo perdis signifan figuron beletran kaj kulturalan. Okaze de la reveno de lia naskiĝa tago (12-an de majo 1872) ni volas revoki en vian memoron la nomon de A. Vermeyleen,



granda Flandro, gvidanto de la skolo « Van Nu en Straks », doktoro pri la Historio, profesoro pri la Arto en Bruselo (1901), kaj pri la historio de la nederlanda literaturo (1902), unua rektoro de la flandrigita Gent-a Universitato (1930) kaj poste socialista senatano por Bruselo, nia ĉefurbo. Li studis en la universitato de Bruselo, Berlino kaj Vieno.

Liaj verkoj estas jenaj :

Du romanoj, « De Wandelende Jood » (1906 : La Migranta Judo), kaj « Twee Vrienden » (1943 : Du Amikoj), eseoj kaj kritikoj arigitaj en « Verzamelde Opstellen » (1904-1905 : Kolektitaj Redaktaĵoj), « Beschouwingen » (1943 : Konsideroj), « Van Gezelle tot Timmermans » (1923 : De Gezelle ĝis Timmermans) kaj fine « Geschiedenis der Europeesche Plastiek en Schilderkunst » (Historio de la Eŭropa Plastiko kaj Pentroarto).

Se tiuj ĉi verkoj ne tre multnombros, ili havas la netakseblan meriton de la stila valoro kaj de la kerneco : li sciis precize, koncize, tipe majstre formuli, ĉar li klare komprenis kaj esence sentis, tiel ke oni iam nomis lin : « Vermeyleen, la matrico » (M. Roelants). Li sendube ludis egan rolon en la kreado de la nuna Flandrolando, almenaŭ intelektue, kaj en la renasanco de ĝia literaturo.

« Ni devas esti Flandroj por fariĝi Eŭropanoj! », li foje ĉizis en siaj « Verzamelde Opstellen » : ĉu oni povus pli trafe resumi la tezon de ia helpa karaktero de internacia lingvo kaj de la rilatoj inter nai flandra (nederlanda) lingvo kaj Esperanto?

La fragmento, kies tradukon ni prezentas al niaj legantoj, estas la komenca parto de « La Migranta Judo » kaj ĝian esperantigon kaj preson en F. E. afable permesis la heredantoj de la aŭtoro.

Dro T. VAN GINDERTAELEN.

Kun la manoj en la poŝoj, Ahasvero kubutante ŝovigis tra la svarmo, sufiĉe senfida : « Ni foje vidu tiun ulon... »

Li vidis lin, — li vidis la grand-seriozan aperon, kun la longa vizaĝo, la iom amara buŝofalto kaj la amoplenajn okulojn. Kaj ĉio subite silentis en li, li streĉe aŭskultis kaj la voĉo penetris en lian kordon, estis kiel se potenca mano premis lin. Jes, jen viro! kaj lia parolo aliris Ahasveron kiel simpla nuda vero. Tamen, tamen, li foje esploru... Kaj Ahasvero baraktis, ĉar multon li ne komprenis kiel li volis, sed malgraŭe unu aferon li tuĉ perceptis : ke la ajaro renversigis; neniu ŝtonon de la granda Templo, kiu tie suprenkulpis en la ĉielo, kiel perforto ora kaj blanka, oni lasos unu sur la alia... « Ne kredu ke mi venis porti la pacon sur la teron; mi ne venis porti pacon, sed la glavon. » Kaj la okulo de Jezuo rekte trafis Ahasveron, kiu silente rigardis lin kun abrupta, li ne sciis kial, freneza jubilo en sia nodita gorĝo.

Poste li hontis pri tio, kaj ŝajnis al li ke la Nazaretano sorĉas lin : ĉar, estante antaŭ li, li sentis ke li estas homo kaj ke ekzistas aliaj homoj kiaj li mem, kaj ke la vivo havas eliron, kaj ĉiuj aferoj ja tute simplas. Sed kion li fakte esperis? Li ne sciis. Kaj hejme la dubo ankoraŭ pli rodis kaj okupis lin kaj tiam li malamis tiun ĉi Jezuson, kiu incitis la mutan ardon interne de lia brusto, ĉar nun lia animo ne plu povis dormi.

Ho, se li povus foje tiri ĉiujn ĉi stultajn knabinojn kaj gapulojn, ĉi babilemajn kaj mallaboremajn homaĉojn for de la Viro, kaj se sidi sola kun li, vespere, kaj preni lian manon en la sian, kaj rigardi en liajn strangajn kvietajn okulojn, kaj demandi al li kion li faru! Ĉar li ne sukcesis forgesi ilin, la dolĉan voĉon kiu sonis el la profundo tra la avidaj lipoj, la decidajn vizaĝon, la rigardon kiu hazarde falis sur lin kaj en kiu li legis, jes, klare legis, ke ankaŭ en Jezuo, kiel en li mem, io brulis, io kion li ne sciis regi...

Sed tia nebulo de fajra malĝojo ĉirkaŭis lian tutan estaĵon, kiam li lasis la rigardon gliĝi sur lian esperplenan popolon kaj pli foren al la altaj kreneloj de Jerusalemo, ke Ahasvero ne kuragiĝis alparoli lin.

Li silentis iom distanca, kaj ofte, longe rigardante lin, li antaŭsentis grandan feliĉon, kvankam turmentis lin plu, ke ĉi tiu feliĉo estas tiom nepalpebla. Sed ja tion li sciis : ke jen estas viro kia li mem, viro kiu komprenus lin, kiu povus savi lin, kaj kiam li fine, laŭ sia promeso, briligus la glavon super la griza mondoputo, ho, jes! tiam li, Ahasvero, sovaĝus en la batalon, tiom apud li kiom eble, kaj luktus ĝiskrako, obstine kaj gaje kaj triumfe ĝis la morto, ĉar, por kiu batali? li ne povis diri tion : la ĉielo ĉiam estus la ĉielo, tiom alta super nia kapo, kaj la tero ĉiam restus en sia loko, kun malkuraĝuloj sur si, — sed por fine saltrektiĝi el sia keleto kaj sia sufoka vivo, kaj trahaki por si vojon al io

alia, io ajna, al la sensenco, al sanga frenezo, kaj ja momenton danci sur la de-truita vivo en granda festo de malespero pro kiu la mondo fendigis kaj pereus...

Sed Jezuo nur predikadis kaj disputadis plu kun la pastroj, kaj ĉar, ioman tempon Ahasvero pli sekvis lin ol prizorgis sian laboron kaj dronis en la ŝuldoj, aperis en lia kelo, la jaŭdon antaŭ Pasko, mallonge-dika, malafabla viraĉo kun bunta turbano kaj alte plumgarnita, kiu parolis : ke venontsemajne oni vendos lian aĉan meblareton kaj lasos al li eĉ ne najlon por grati sin.

Iometon Ahasvero deziris smaĉigi la cerbon de tiu ĉi moŝteto kontraŭ la muron. Sed io rompigiĝis en li; li ne moviĝis kaj silentis kaj silentis, kaj rigardis kiel besto kiu vidas la morton. Li ree sentis la pugnon, kiu tenis lian nukon, lia fato estis lia karcereto, li ne plu eskapas. Kaj jen li fordrivis, sen volo, duone enŝlimiĝinta. Li nur estu ses futojn sub la tero! Kiam oni estas morta, ĉio finita, li pensis; la homoj same malfortas antaŭ la bono kiel antaŭ la malbono, ili indas nek Ĉielon nek Inferon. Sed tute nenio, tute nenio, ĉi tio ŝajnis al li ankoraŭ pli terura ol la inferobruo mem.

La ardo ree ekflamis en li, ne trovis eligon : li sentis mortan lamon ŝtelumi en lin kaj sovaĝa rabio ŝaŭmis en lia rompita kapo, vane, vane! Post unu alia horoj gliĝis for kaj li ankoraŭ sidadis kiam la mallumo kovris ĉion. Li malvarmiĝis, liaj dentoj klaketis. Ho batali! batali! Kontraŭ kio? Egale... Li ja ne tiel forpasu, li volis momente pereji en ĉi detrua falo, sed li ne povis plu pensi, la tuta mondo ŝajnis al li malplena, tiel terure silenta... Fine li kuŝis sur sia pajlilito, kaj ree la horoj fluis sur li, ĉio malklariĝis, sinkis...

Kiel Jezuo eniris? Ahasvero eligis ridon stultan, senŝonan, kiam li vidis la okulojn febre brilaj en la pala vizaĝo. Estis kiel la tagon, ĉe la Urbopordego. « Mi ankoraŭ havas tranĉilon », Ahasvero diris, « ĝin ili ne volos forpreni de mi... » Ili kuris en la strato, ĉirkaŭe pelataj de hasta premado de uloj kun klaboraj kaj hakiloj, kaj forĝmarteloj portitaj sur ŝultregoj. De ĉie, el ĉiuj stratetoj, venis homo- kaj ĉevalotretado, ĉiu komprenis la neesperitan mesaĝon. Ahasvero kuris por antaŭi, kaj jen li staris kun Jezuo supre de la Templo, ĉe la ora kupolo, tiom proksime al la palekrepuskanta Laktovojo, ke li preskaŭ povis pluki la ruĝajn stelgrapolojn kiel fruktojn. Super Jerusalemo brilis kometo, altega senmova en la svarma nokto, kiel sanga glavo. Ha ha! jen la domoj de la uzuristoj ekbrulis en la turo kun gaja krako, kaj la flamoj flirtis kaj dancis sur la sulfura firmamento... Sed vidu, sube en la mallumo, estis ununura tumulta maro da palaj vizaĝoj, kiu torpentis tra la tuta Placo kontraŭ ŝtuparojn kaj portalojn. Obstine la murmpiloj bategis; nun la ajaro disfalos, pensis Ahasvero, ĉar la marmoraĵ pavimeroj skuigis sub liaj piedoj. Sed ankaŭ ĉi tio ŝajnis al li tre komprenebla; lia decido estis roka : kun sovaĝa ĝojo li tondros suben aŭ eble kroĉiĝos al la steloj... Nun la popolo jam bruas enen kvazaŭ tra kluzoj, li aŭdis kriadon de perfortitaj virinoj, kaj kontinuan tiratan furiozan muĝon kaj tiam kaj tiam tamburadon kaj la stultan pepetadon de fajfluteto, kiu estis kia la argenta voĉeto de infano sur batakkampo. La tuta frakaso ebruiĝis Ahasveron kaj ensnufi la varman odoron de sovaĝa besto en lavanga interpretado bonfaris al li. Subite la mortangora, nuda kapo, de la asigistoj aperis super la krenelo, li volis surgrimpi ĝin, ĉar de sube miloj da buŝoj alalarmis lin, kaj li petegis, liajn manojn krampante al la defluido. Sed Ahasvero ambaŭpiede premis lian ŝiman fromaĝokapon kaj tiam vidis la vireton petol-svinge tordigis en la vertigan profundon. Tio ĉi subite ekscese frenezigis lin, estis kvazaŭ li nun povus displiti la mondon kiel alumeton; idiote ridante, li subenkuris la spiralan ŝtuparon, super lia kapo sonis la sonoriloj, kaj li turniĝis, senfine turniĝis, en la mallumo, pelata de la timo ke li eterne subenkuros ĉi tiun spiralan ŝtuparon, sen eliro el la abismo; sed li ankoraŭ klare aŭdis la sonorilojn bum-bumi kaj la bruo ekstere, kaj li ree staris sur la placo, puŝata kaj portata de impeta homorivero. La sonotempesto ŝajnis batigi el la ŝtonoj, li sentis siajn piedojn moligi pro la varmeta sango, li volis forskui sin, li kriis, sed la sango altiĝis en li, ĝi ster-toris en lia gorĝo, li sufokiĝis, kaj kriis, kriis...

...Kaj vekigis, sur sia pajlilito, kiam febra korpo, tutapertaj okuloj fiksigardantaj la svarman mallumon; lia koro bategis... sed li ankoraŭ aŭdis la bruon kaj la vibregadon de la sonoriloj... Ne estis sonĝo... Nun li ja viglis, li rekonis la sonoradon de diversaj turoj- ne, ĉe eblis? Sed de tre fore venis la surda bruo de popolamaso, kaj pli proksime obtuza tamburado: kiu nun, je tiu ĉi nokta horo, vespersignalis? Paŝoj urĝiĝis tra la dormaj stratetoj, li streĉe aŭskultis... Jes la popolo elbridiĝis, ekis tumultoj, kaj la sonoriloj, la sonoriloj, tien kaj reen ili saltis super la urbo! Tiu diabla Nazaretano, li tamen riskis la aferon! « Mi ankoraŭ havas tranĉilon! » ridis Ahasvero; jes, estis bona, afabla tranĉileto : « Li ja vidus... li estos kontenta... » Kaj stranga beato tiel potence levigis en li ke por li morto identigis kiu vivo, se li nur povus sovaĝe triumfe cedi al sia malespero.

VIZITU LA LIBRO-STANDON DE FLANDRA ESPERANTO INSTITUTO OKAZE DE LA XI-a KONGRESO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA Dimanĉon la 9-an de Junio en « Cooperative », Hoedemakerstraat, Brugge.

Plaatselijk Nieuws

ANTWERPEN. — Op Woensdag 8 Mei sprak Dr. T. van Gindertaelen alhier over « La jura aspekto de la proceso Breen-donk ». Het was een hoogst actueel onderwerp die de belangstelling wekte van de overtalrijk opgekomen luisteraars (het organiseerend comité beloofde andermaal voor meer zitgelegenheid te zullen zorgen!).

Op Woensdag 5 Juni a.s. spreekt om 20 u. Sano M. Jaumotte in het Esperanto-Huis der Lange Leemstraat 127. Zijn spreekbeurt zal de schitterende reeks Esperanto-voordrachten besluten die dit seizoen door het coördinerend Esperanto-comité der Scheldestad met veel succes werd ingericht.

BRUGGE. — « Paco kaj Justeco », de wakkere afdeling van den Vl. Esperantistenbond werkt onverpoosd met man en macht aan de organisatie van ons XI^e congres. Wie de jeugdige bezieling weet die in deze verdienstelijke vereeniging heerscht zal niet twifelen aan het succes van ons landelijk congres en overtuigd zijn dat voor ons te Brugge enkele mooie dagen in het verschiet liggen.

GENT. — De Esperantistenvereeniging « Kunlaboro » heeft een offensief ingezet voor het wereldpetitionnement ten voordele van Esperanto. In recordtempo willen de leden duizend verklaringen verzamelen. Wie doet het hun na?

BRUSSEL. — Met Paschen vergaderde alhier de Arbeiders Esperantisten in congres. Belangrijke beslissingen werden getroffen aangaande de organisatie van de Beweging in arbeiders-kringen hier te lande.

Op Pinksteren organiseert « Reĝa Belga

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

ATENTU: La regularon bonvolu legi en la januara numero.

PREMIO: Sano F. Roose el Brugge gajnis la martan premion: « La Mistero de l'Sango » de O. Forst de Battaglia.

SOLVO DE LA 12-a ENIGMO

HORIZONTALE. — 1. tre; buf; ses. — 2. kia; alt. — 3. las; lul; ung. — 4. tranĉil. — 5. pore; stal. — 6. fakul. — 7. tial; astr. — 8. nuntemp. — 9. pag; iel; leg. — 10. ulm; ili. — 11. ŝel; ber; ted.

VERTIKALE. — 1. tulip; tapis. — 2. oni. — 3. ekstr; angul. — 4. refl. — 5. bala; nimb. — 6. unik; te. — 7. falĉ; elir. — 8. islam. — 9. stult; split. — 10. akt. — 11. ŝegil; reĝid.

13-a ENIGMO: KRUCVORTO

HORIZONTALE. — 1. legomo (R); eksciti al rapida kurado (R). — 2. spaco inter difinitaj limoj (R); okupo, konsistanta en plenumo de publika aŭ privata servado (R); prepozicio. — 3. iu ujo (R); direkti la elvolvigon de la kapabloj de infano (R); prepozicio. — 4. loko, kie finiĝas iu difinita spaco (R); malmoligi (R). — 5. balanceti (R); mambesteto (R). — 6. atinginta sian plenan kreskadon (R); konscie plenuminta ion riproĉindan (R). — 7. verba finaĵo (R); senhoma (R); adverbo. — 8. tute senvalora (R); ĝi kreskas sur la kapo de kelkaj bestoj (R);

HOTEL MONDIAL
15 Graaf d'Urseilaan 15
HEIST-AAN-ZEE
Nette kamers — Verzorgde keukens
Fijne dranken

Ligo Esperantista » in de hoofdstad een Esperanto-dag. Op Pinkstermaandag is er een uitstap voorzien. Belangstellende gelieven zich schriftelijk te Wenden tot Dr. R. Maes, Notelaarstraat 282, Brussel 4.

sufikso (R). — 9. sufikso (R); iu muzikisto (R). — 10. sendifekta, pura (R); parto de biciklo (R). — 11. dupieda vertebrulo (R); amerika lando (R). — 12. bleki, kiel lupo (R); kolekti kaj pretigi por batalo (R).

VERTIKALE. — 1. Difinita laboro (R); montri al iu, ke oni intencas fari al li malbonajn (R). — 2. jarkalkulo (R); metala kunmiksajo el kupro kaj zinko (R); ĝi indikas danganter lokon al ŝipoj (R). — 3. nova soldato (R); maturaĵulo (R). — 4. sin amuzi laŭ difinita maniero (R); ronde forte agiti (R). — 5. prepozicio; la plej supera rezultato atingita (R). — 6. parte ŝanĝi (R); penado certigi ies bonon (R). — 7. brulanta korpo ellasas ĝin (R); centra parto de io (R); konjunkcio. — 8. ĝi troviĝas sur kelkaj ludkartoj (R); granda publika konkurso. — 9. Sufikso (R); ĉesi moviĝi (R); vorteto uzata kun montraj vortoj. — 10. esplori per la mano (R); rapida ripetado de du sonoj (R); 11. preni likvaĵon el iu ujo (R); prepozicio; malsama (R). — 12. iu koloro (R); plej agrabla loko (R).

La solvoj grandnombre atingi la redakcion antaŭ la 10-an de junio.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

MI PREZENTAS
La modernan Esperato revuon
* belilustrita * interesa * 12' paĝa

Noveloj - artilholoj - poezioj

La plej bela, la plej interesa! Petu specimen numeron sendante unu internacian respondkuponon al

MONDA REVUO ILUSTRITA
Box 30, Randers, DANMARK.
Abonkotizo por 1946 estas: 68,50 bfr.

Pagu al la landa peranto: **Sro MAURICE DAEMS**
Heyvaertstr. 159, Molenbeek-Brussel (poŝtkonto: 3329.95).

LOSSE NUMMERS VAN FLANDRA ESPERANTISTA

zijn te koop:

te Antwerpen: « Esperanto-Domo », Lange Leemstraat 127.

te Brussel: « Esperantista Librejo », hoek Bodenbroek- en Regentiestraat.

te Brugge: Boekhandel « Unicum », Vlamingsstraat 7.

te Mechelen: Boekhandel « Moortgat », Veemarkt 4.

te Turnhout: Boekhandel « De Pelikaan », Otterstraat 68.

CAPITRO 12-a

Kant saltrektiĝis, puŝis Doktoron Gulopez flanken kaj kuregis al la kajuto de Dubois.

Sur la lito, Jean Dubois kuŝis kun vitrecaj okuloj, la vizaĝon angorige torditan. Doktoro De Groot kliniĝis super li. Li eĉ ne levis la okulojn kiam Kant, sekvata de Doktoro Gulopez, eniris la kajuton.

« Nu, Doktoro? »
« Momenton, sinjoro Kant, momenton... mi urgas al la apoteko... Oni neniam scias... Oni provu eĉ la neblon... kvankam... »

La griza kuracisto trenmarŝis el la ĉambro.

« Li mortis. Ne necesas kuracisto por konstati tion. Ĉu vi ankoraŭ dubas, Doktoro Gulopez? »

« Tiuj okuloj!... Terure!... La ŝakmajstro estis tute impresita. La demando de Kant obtuze penetris en lin. Li ripetis la vortojn de Profesoro De Groot: « Oni neniam scias... » Se la kuracisto ankoraŭ dubas...

Oni frapis sur la pordon.
Kant duonapertis ĝin. Tie ĉi li nepre ne deziris scivolulojn. Kelnero staris en la koridoro.

« Pardonu, sinjoro, mi venas preni paron da malplenaj botetoj. »

Kant eliris.

« Malplenaj botetoj? »

« Jes, sinjoro. Antaŭ deko da minutoj, sinjoro Dubois petis ke mi forprenu la malplenajn botetojn de minerala akvo, kiuj ankoraŭ staris en lia kajuto. »

« Ĉu tiam vi estis kun li? »

« Kompreneble, sinjoro, ĉi en lia kajuto. »

« Sinjoro Dubois... estas... grave malsana. Li estas mortanta... »

La kelnero morgis, nekredeme fiksrigardis la okulojn de Kant.

« Tute neeble, sinjoro. Li klare diris al mi ke li ree suferas kapololorojn, kio sufiĉe oftis, sed ne ŝajnis tiel grave. Kiam mi eniris porti al li la boteton da minerala akvo, kiun li mendis, li ĝuste nodis sian kravateton antaŭ la spegulo. Tiumomente li neniel aspektis malsana. Kiu vere malsanas, ja ne tiel staras antaŭ la spegulo nodante sian kravateton kvazaŭ la savo de la mondo dependus de tio. »

« Nu », Kant interrompis la babileman kelneron, « kion diris sinjoro Dubois al vi? »

« Multon li ne diris, sinjoro, ne... Kelnero, li diris, revenu premi post deko da minutoj la malplenan boteton kaj samokaze paron kiu tie ĉi ĝenas jam de hieraŭvespere. »

« Ĉu li trinkis multe da minerala akvo? »

« Nu, sinjoro, « multe » ne estas la korekta vorto, tamen, ĉiun vesperon li petis da ĝi. Li glutas tro da pulvoraĵoj kontraŭ la kapololoro, sinjoro; post iom da tempo, ili ne plu helpas iom, jen mia opinio. »

« Bone », Kant diris, li vidis Profesoron De Groot alveni en la koridoro, « bone, forprenu alifojne la botetojn. Jen la kuracisto. »

« Ho! » ĉi tiu diris, denove starante ĉe la lito, « Estos senutile, sinjoro Kant, mi ankoraŭ intencas injekti atropinon... »

JAĤTO VETURAS EL..

Verkis: Deck Dorval.

Tradukis: Dro T. Ken.

« KRIMINALA ROMANO »

Li dolĉe kapskuis, la afablaj okuloj direktiĝis supren. Li metis du flakonojn sur la tualetan tablon. Kant legis « Atropina Sulfato » kaj « Kloralo ».

« Morto pro venenigo... » eksplikis Profesoro De Groot.

« Buŝa konsumo? » Kant demandis, kvankam li ne dubis pri la respondo.

« Sajne, jes... » Kaj la Profesoro signife kapmontris la tualetan tablon, sur kiu staris duonplena glaso kaj, flanke de ĝi, boteto da minerala akvo.

« Kiu la unua trovis Dubois? » Kant demandis.

« Iel mi », diris Doktoro Gulopez, « sed mi havis la impreson ke li ankoraŭ vivas. Kiam mi atingis lian pordon, mi aŭdis lin krii. Mi frapis, ree frapis, sed vane. Respondo ne sekvis. Precize tiam Doktoro De Groot aperis en la koridoro. Ni aperitis la pordon kaj vidis Dubois kuŝanta sur la planko. Kune ni metis lin sur la lito. Tiam mi venis averti vin. »

« Versajne jam tiumomente estis tro malfrue », diris Profesoro De Groot.

Kant demande rigardis Doktoron Gulopez.

« Mi havis la impreson », ĉi tiu deklaris, « ke kiam mi levis lian kapon, la korpo ankoraŭ moviĝis... »

« Eble, eble », respondis Profesoro De Groot. « Povis esti kuntiriĝo de la muskoloj. Sciu ke, post la efektiva morto, ia... »

La eniro de la kapitano Joost interrompis la medicinan disvolvon. La kelnero jam avertis lin ke io stranga okazis al Dubois.

Li konsternite fiksrigardis la torditan vizaĝon de la komponisto.

« Kio nun krome okazis? » Li demande rigardis Kant.

La inspektoro tutkompreneble mansingnis al la mortinto.

« Do, li tamen estis la kulpulo! Mi ja pensis tion. Hieraaŭvespere li lerte mistifikis nin per sia am-alibio. Ĉu mi ne pensis tion? Kaj, se ni konsideras ĉion, ankaŭ fraŭlino Sterlen mensogis. Kion mi nun faros? »

Hans Joost furiozis.

« Neniam mi fidis sin. Si venas sur la ferdeko kaj fiksrigardas vin per okuloj, okuloj... Pardonu! Sed tio ne trompas la kapitanon Joost. Aliaj ondegoj jam superverŝis min! Neptuno! Neptuno!... »

Kant ne atentis la bombaston de la kapitano Joost. Li plenatentis la tualetan tablon. Apud la glaso da akvo li trovis skatoleton da pulvoraĵoj kontraŭ neŭralgio.

« Hm! Profesoro De Groot, ĉu vi opinias ke trouzo de tiuj ĉi pulvoraĵoj povas kaŭzi venenigon? »

La kuracisto manprenis la skatoleton.

« Ne, tio maleblas. Reala trouzo eble iomete ĝenas la normalan digeston. Ne pli. Kontraŭ ĉiu kapololoro... jes, kio fakte estas kapololoro...? »

« Do, Doktoro De Groot », Kant evitis pluan eksplikon, « se mi bone komprenas, la morton de sinjoro Dubois kaŭzis rapidaga veneno? »

« Jes, mi kredas tion, sed... » Li mistere levis ambaŭ manojn. « Mi antaŭ ĉio volas certi. Mi jam fariĝis tro maljuna kaj ne plu diagnozas kiel ajna sensperta knabo! Se vi permesas ke oni konduku la kadavron en la fleĝejon, mi tie prenos la necesajn specimenojn kaj ekspertizos ilin. »

« Bone, Profesoro, mi malpacience atendos la rezultaton. Kapitano Joost, ĉu vi forportigos la mortinton? »

« Jen la dua! Agrabla veturo! Kaj ni ja devas meti, en la saman fleĝejon, la viktimon kaj ĝian murdanton! Ankaŭ belajo! » Tiel la kapitano ellasis sian koleron. Sekve, pripensinte: « Kion vi opinias, sinjoro Kant, ĉu mi igos mian markoniston telegrafi al Marseille la memmortigon de Dubois kaj... ke la kazo Maxton estas solvita? »

« Ne tro rapide, kapitano! Antaŭ ĉio certi, kiel diras Profesoro De Groot. Eble li pravus pri tio... »

Ĉi tiu gojis pri la rimarkigo de Kant. Li afable fidetis al li kaj kontente interfrotis la manojn kiam li, sekvata de la grumblanta kapitano, forlasis la kajuton.

Kant sopiris.

« Fine solaj! » Li manprenis la skatoleton da pulvoraĵoj. Ĝi ankoraŭ duonplenis. Sur la etiketo staris la nomo de konata Antverpena apoteko.

Sekve li aperitis la tirkeston de la tualeta tablo. Ĝi enhavis plenan kolekton da uĵetoj, flakonetoj kaj skatoletoj por la plej diversaj celoj, inkluzive de kosmetikoj kaj kuracilo kontraŭ marmalsano. Inter ili, deko da skatoletoj da pulvoraĵoj de la sama marko kiel tiu staranta sur la tualeta tablo.

Frapon sur la pordon, kaj Alex Steinmann eniris.

La juna Steinmann videble tro trinkis.

« K... Kion mi aŭdis?... Ĉu... ĉu Jean mortis? »

« Sinjoro Dubois efektive forpasis », Kant atente rigardis la junulon. Nur nun li rimarkis ke li havas kontuzon sur la vangosto.

« Forpasis? » La voĉo sonis malespere. La viro subite elebriĝis. Liaj okuloj videble, serĉis ion en la ejo kaj tiam haltis sur la kadavro.

« Ĉu mi povas peti, sinjoro Steinmann? » La gesto de Kant ekskludis pluan eksplikon. Alex Steinmann rektiĝis kaj adoptis dignan konduton.

« Estas terure! Mi... mi dankas pro la informo. » Malfrime paŝante, li malaperis kaj cedis lokon al Profesoro De Groot kiu, kun du maristoj, venis forpreni la kadavron.

Kant fermis la pordon malantaŭ ili.

« Doktoro Gulopez, tiu ĉi estas verŝajne la plej granda afero en mia kariero. Dubois estas murdita. »

« Ĉu vi certas? » Doktoro Gulopez ne kaŝis sian miron.

« Nur malsaĝuloj certas; sed mi estas konvinkita. Kial Dubois estus memmortiginta sin? »

« Nu, tio estas ja logika! »

« Ne, ne! Li ne murdis Maxton. Tio estas fortika kiel roko kaj sur tio mi volas konstrui plu. Dubois kapablis multon, eĉ murdon. Sed mia homokono sufiĉas por konjekti ke li ĉiukaze ne estis tipo de la mematencanto. Cetere, li ne havis motivon, donis nekontesteblan alibion kaj nepre opiniis sin heredonta parton de la posedadoj de Maxton. »

« Tio ne estas tute certa... »

« Ĉiukaze, li certe pensis kaj esperis tion... »

« Jes, se oni konsideras ĉion, tamen... »

« Ne, Doktoro. Krome unu rigardo sur la kadavron sufiĉis. La viro estis alives-tanta sin. Ĉu vi rimarkis la okultrudan kravateton. Ĝin li surmetis ĝuste antaŭ sia morto. »

« Kiel vi scias...? »

« Jes, tion rakontis al mi la kelnero, kiu portis la mineralan akvon al li. » Kant resume raportis kion tiu ĉi diris. Malgraŭe, la ŝakmajstro ne estis tute konvinkita.

« La reagoj kaj inspiroj de senespera cerbo ne ĉiam estas sondeblaj. La spirito de Dubois ne estis tre ekvilibra. Tia, pro sia nenormaleco, sia senkaraktereco, ĝi iam obeas nerezisteblajn potencojn kiuj subite levigas el la profundo de la animo. »

« Ne malbone konjektita, sed vi forgesas ke ĉio indikas ke nun io tia ne intervenas. Ekzistis tre bona motivo por forigi Dubois. »

« Kiel? Kial oni...? »

Doktoro Gulopez subite haltis kaj ekkompreno pentriĝis sur lia vizaĝo. Tiam li malrapide diris:

« Efektive, li sciis kiu murdis Maxton. »

« Kial mi ne avertis lin? Sed kio pasis ne revenos... kaj jen ni restas. La unua krimo ankoraŭ ne estas klarigita kaj dua jam okazis. Ĉu vi volas peti fraŭlinon Sterlen en mian kajuton, mi diru, je la kvara? Mi ankoraŭ iom atendas Profesoron De Groot. Do, je la kvara. »

Doktoro Gulopez foriris.

Kant pensema sidigis sur seĝon. Kvazaŭ laca li momenton fermis la okulojn, bruligis pipon.

« Ĉu mi ĝenas, sinjoro Kant? »

« Nu, Profesoro, jam preta? »

« Mi ne devis longe serĉi. Cetere, ĉio indikas ke mia unua hipotezo estas ĝusta. La simptomoj... »

« Kiu veneno estas? »

« Sinjoro Kant, jam dekomence mi supozis tion, sed « certeco antaŭ ĉio ». Estas striknino... » (Daŭrigota.)